

Pascal Dubourg Glatigny: Literaturo por progresantoj

Radioprelego, SRI 1990, 005-B-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-005/SRI-1990-005-B-3-Pascal-Dubourg-Glatigny-por-Claude-GACOND-Literaturo-por-progresantoj.mp3>

PDG.- Saluton! Por la Esperanto-Fako de Svisa Radio Internacia parolas Pascal Dubourg Glatigny, anstataŭante Claude Gacond.

Antaŭ unu semajno en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds mi havis okazon organizi vesperon por interkonatiĝo de diversaj esperanto-verkistoj. Tie estis grupo de staĝantoj, kiel en multaj semajnoj dum la tuta jaro en La Chaux-de-Fonds, lernantoj, esperanto-progresantoj. Kaj la celo de tiu vespero estis do ne organizi seminarion pri esperanto-literaturo kaj esperantologio, sed la celo estis iom malkovrigi, helpi tiujn homojn elekti kelkajn romanojn por legi, por komenci la legadon de diversaj libroj. Kaj mi rimarkis, estis tie homoj de diversaj niveloj, kompreneble, kaj kun granda surprizo, fakte, mi rimarkis ke eĉ homoj, kiuj praktikas la lingvon de pluraj jaroj kaj eĉ instruas ĝin en sia loka klubo aŭ aliloke, ne tre bone konas nian literaturon, kelkajn bazajn verkojn eĉ de la lingvo. Jes, tio limiĝas kompreneble al kono de Zamenhof, de Kalocsay, de Baghy kaj de diversaj aliaj modernaj verkistoj, kiuj multe eldonas, kaj kiuj estas tre famaj, kiel Piron aŭ do Valano, laŭ verkista nomo kaj Nemere. Sed do en tiu vespero estis unue tre malfacile elekti, kiun verkistojn, kaj mi decidis elekti do laŭ ŝato, kompreneble, sed mi elektis ankaŭ figurojn de la esperanto-literaturo, kiuj ne estas tiom konataj, kvankam ili verkis jam antaŭ multaj jaroj kaj kvankam ilia verkaro komencis disvastiĝi en la esperantistaro antaŭ sufiĉe multaj jardekoj.

Kaj do mi elektis por tiu vespero kvar diversajn figurojn, sufiĉe diverstipajn kaj diverstipaj laŭ la vivo kiun ili havis, sed ankaŭ laŭ la verko kiun ili produktis. Do estas tri prozistoj kaj unu poeto. La tri prozistoj fakte apartenas al la dua, eventuale al la tria periodo, se oni uzas la kategoriojn de Auld. Kaj do temas pri Eroŝenko, Lujken (?), Verda Majo (mia ŝatata Verda Majo el Oriento) kaj Edwin de Kock.

La problemo de la kono de la esperanta literaturo ne nur devas esti ŝuldata al la lernantoj, al la homoj, kiuj praktikas la lingvon. Kiel esperantistoj ni devas konstati, ke vere estas kelkaj problemoj pri distribuado de la libroj kaj pri disponebleco de la merkato. Jam oni devas bone konscii ke estas tre malfacile elekti libron, kiun oni trovas interesa. Do, kiam oni promenas en librovendejo, aŭ kiam oni parolas kun amikoj, kaj la kontaktoj inter esperantistoj ne estas tiom oftaj, kiom ili devus esti, ĉu ne?

Se vi promenas en la librovendejo kaj trovas iun titolon allogan, iun kovrilpaĝon, do anoncon sur la kvara kovrilpaĝo allogan kaj iom foliumas, legas la tekston, tio povas esti bonega instigo. Sed en la kazo de Esperanto ni devas bone konscii, ke elekti el listo, kiu konsistas nur el nomo de aŭtoroj, nomo de la libro kaj el prezo. Foje eĉ el nombro-paĝo, estas sufiĉe malfacile por decidiĝi. Kaj la dua problemo estas ke sur la merkato de Esperanto la plej klasikaj verkoj aŭ verkoj, kiuj aperis antaŭ multaj jaroj kaj kiuj konsistigas la esencan trezoron de nia literaturo, la plej multo de tiuj verkoj elĉerpiĝis kaj tute ne plu estas disponeblaj. Do la verkistoj, kiujn mi elektis estas ankoraŭ legeblaj sufiĉe facile, do preskaŭ ĉiuj estas troveblaj en la plej gravaj librovendejoj de la movado, sed estas kelkaj aferoj, pri kiuj oni tute ne povas paroli, ĉar se oni parolas pri ĝi kaj la homoj ne povas akiri la libron aŭ iri en biblioteko kaj ĝin trovi por legi hejme, ne estas la ebleco malkovri tiun aŭtoron. Kaj do okaze de tio, ni devas saluti sufiĉe interesan iniciaton, kaj kiu mankis, estas la serio de

reeldono de esperantaj klasikaĵoj, kiun komencis antaŭ preskaŭ unu jaro nun, Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto.

Oni renkontas alian problemon, kiam oni komencas legi la esperanto-literaturon, kiam oni komencas interesiĝi ne nur pri la lingvo, do kiam oni post certa nivelo, kiam oni povis atingi la legokapablon sufiĉan por mem legi sen tro da problemoj, sen tro, ne perdante tro da tempo en la vortaro, oni dezirus trovi kritikan materialon, kiu povu gvidi iom la leganton, la novan leganton tra la literaturo. Kaj tiu materialo, ni devas konfesi, estas ankaŭ ĉi tie ne ekzistanta kaj tio estas vera problemo. Do, ekzistas kelkaj antologioj, kiuj donas biografion de la verkoj. Poste estas tre grava verko, sed kies kompetenteco haltas sufiĉe frue en nia tempo, ĉar ĝi ne estis renovigita. Temas pri la Enciklopedio de Esperanto. Mi pensas, ke estas nun pristudata refaro de tiu enciklopedio, sed la tempo pasas kaj la novaĵoj estas maloftaj. Do tiu enciklopedio liveras sufiĉe multajn informojn. Kaj mi devas diri ke pri Eroŝenko kaj Lujken mi ĉerpis sufiĉe multajn informojn el tiuj fontoj.

Poste: la biografioj. Du el la verkistoj, pri kiuj ni parolis do dum tiu vespero, estis Eroŝenko kaj Verda Majo. Do homoj, kiuj vere havas, havis aventuran vivon kaj kiuj havis vivon tute eksterordinaran por la tempo. Kaj ne nur, ĉar ili parolis la internacian lingvon kaj estis en kontakto kun internacia medio, kiam tio ne estis tiom ofta aŭ ne tiom ofta en tiu senco, en kiu la esperantistoj kutimas praktiki, sed vivoj absolute rakontendaj, mi pensas. Kaj Eroŝenko kaj Verda Majo preskaŭ neposedas biografiojn en nia lingvo. Pri Eroŝenko ekzistas biografioj en la rusa lingvo kaj en la japana lingvo, ĉar vi scias, li estis verkisto ankaŭ en tiuj lingvoj. Kaj estas interese rimarki, ke iu, kiel Eroŝenko, kies vivo estis strikte ligita al Esperanto, tiu fakte vekas intereson ĉefe ekster la esperantomovado kaj en la lingvoj en kiuj ankaŭ li verkis, do rusa kaj japana.

Mi ne parolos pri la monografioj, ĉar ili estas ankoraŭ pli eraraj, pli maloftaj kaj la legogvidiloj estas preskaŭ ne troveblaj. Ne ekzistas serio, kiu povu gvidi la lernantojn. Kaj mi scias, ke tio estas problemo, ĉar ankaŭ ni ne lernas esperanton aŭ la esperantan literaturon en la lernejoj. Sed legogvidiloj, kiuj donus la ĉefajn informojn pri la verkisto, pri la verko, kiu donu resumon de la diversaj partoj kaj pristudeblajn temojn, ke oni povu pripensi la verkon, kaj ankaŭ, kiu resituigu la verkon en la mondon, en la historion en kiu ĝi verkiĝis, literatura historio kaj monda historio, sed ankaŭ rilate la historion de la esperanta literaturo, kaj tio estus tre grava helpilo por multaj esperanto-progresantoj kaj mi pensas, ke multaj homoj interesiĝus pri tio.

Do, la elementoj, kiujn ni havas ĉefe reduktiĝas al antaŭparoloj kaj editoraj notoj. En la kazo de Eroŝenko estas tre bonaj editoraj notoj de Minejo Sitaka, kiu estas la editoristo de Eroŝenko por la japana esperanta librokoooperativo, kiu reeldonis la librojn sufiĉe lastatempe, kaj kiuj ebligis, ke tiuj libroj de Eroŝenko, kelkaj noveloj de Eroŝenko estu legeblaj.

La venontan semajnon ni havos okazon komenci paroli iom pli profunde pri Heinrich August Luyken, do la verkisto de [Pro Iŝtar](#), sufiĉe konata. Ĝis reaŭdo!